

BELGA ESPERANTISTO

49a Jaro — N-ro 6a — Aŭgusto-Septembro 1957a

Redaktoro-Administranto:

la Prezidanto de R.B.L.E.:

Maur. JAUMOTTE

Avenuo De Bruyn, 44

Wilrijk-Antverpeno

Oficiala monata Organo de

REGA BELGA LIGO ESPERANTISTA

Asocio sen profita celo,

aliĝinta al UNIVERSALA ESPERANTO-ASOCIO

Fondita
en 1908a



Abonprezo:
Fr. 100,-

La Universala Ekspozicio de Bruselo ... kaj Esperanto

Ni ĵus ekscias ke la paŝoj, faritaj jam antaŭ iom da tempo apud la Administrantaro de nia Universala Ekspozicio 1958, kondukis al unua sukceso: *Tiu ĉi Komitato akceptis Esperanton, kiel plian lingvon en kiu povas ekzameniĝi tiuj bonvolemluloj, kiuj deziras plenumi, dum la Ekspozicia periodo, la taskon de „bonvola interpretisto“.*

Ĝis nun estis akceptataj nur la lingvoj angla, germana, hispana, itala, portugala kaj rusa. Kaj nun la Komitato de decidis aldoni al tiuj ĉi lingvoj: Esperanton.

Por la ses cititaj lingvoj, la ekzamenoj okazos en specialaj lingvaj lernejoj. Por Esperanto, la Komitato decidis ke estos la oficialaj instancoj de nia movado, kiuj respondecos pri la ekzamenoj, kiuj rajtigos al portado de la speciala „badge“ aŭ insigno.

Ni tuj volas aldoni, ke ne temas pri iu salajrata funkcio, kiun do povus plenumi nur tiuj personoj, kiuj estos liberaj dum la tuta ekspozicia periodo.

Temas pri personoj, kiuj volas pretiĝi por la granda kampanjo de kora akcepto de la eksterlandanoj, okaze de nia Ekspozicio, kaj kiuj akceptos gvidi grupojn, dum siaj liberaj horoj, je tagoj kaj momentoj fiksotaj de la interpretistoj mem.

Sed, ĉar tre certe Esperantistaj grupoj kaj karavanoj vizitos nian landon, — ekzemple antaŭ kaj post la Universala Kongreso de Mainz, kaj, dum la tuta periodo, ankaŭ el apudaj landoj, — estas certe dezirinde, ke ne nur la Komitato de la Ekspozicio, sed precipe ni mem disponu pri personoj, kiuj bonvolos rondirigi tiujn grupojn kaj kiuj povos tion fari en la plej bonaj kondiĉoj, ĉar ili prepariĝis por tiu funkcio.

Tiuj interpretistoj ĝuos la apogon de ĉiuj servoj de la Ekspozicio por sia propra informado kaj tiu de la vizitan-

toj mem. Ili ĝuos ankaŭ gravajn rabatojn kaj havos la rajton porti la specialan insignon, kiu atentigos pri nia movado, ĉar ĝi enhavos la kvinpintan verdan stelon.

En nia proksima numero, ni povos doni pliajn klarigojn; sed, ekde nun, ni direktas varman alvokon al ĉiuj, kiuj konsideras sin kapablaj plenumi tiun taskon, por ke ili sin enskribigu senprokraste.

Maur. Jaumotte.

HELPU ĈIUJ!

Post kelkaj tagoj komenciĝos, en la diversaj urboj, la elementaj Esperanto-kursoj.

Estas la momento en la jaro, kiam estas ne la estraroj, sed la membroj mem, kiuj nepre devas „labori“, t.e. plenigi la klusojn, tiel ke nia movado povu, ne nur postvivi kaj stagni, sed antaŭeniri al plena sukceso.

Ĉiu alkonduku almenaŭ unu kandidaton!

Sepdek Jaroj - Rekono kaj Admono

La laca cenzuristo Varsovia, kiu la 14an de julio 1887a preskaŭ hazarde krajonis aproban signon sur la modesta manuskripto Zamenhofa, certe ne sentis la misterajn fantomojn proklamantajn ke io granda naskiĝis. Por li la kajero estis naŭva ludajo sendanĝera; li ne sentis ke ĝi estis la sopiro kaj volo de dudek jaroj, la elfluo fermentinta dum longa junaĝo en poeta animo. Eble li kompatridete permesis al ĝi la historion de similaj eksperimentoj: fundiĝo en polvo kaj forgeso.

Spite Esperanto ankoraŭ nun, sepdekon poste, floras kaj fortas kaj kompleksas al neniu, ŝanceliĝi. Ke nia movado, - al vivo vokita de senriĉa okulista junulo - organizo kiu neniam ĝuis eĉ plej etan protekton aŭ kapitalon transvivadis, estas (tion ni simple kaj modeste konstati) miraklo. Ne perdiĝis la nukseto en la oceanaj ondoj sed ĝermis kaj kreskis kontinue sepdek jarojn kiuj pli skuis la mondon ol iu sepdeko antaŭa.

Nia ideo ne velkis dum kanona bruado kiam dormis la racio kaj silentis la konscienco. Kiam la venĝaj kriadoj bestecaj plej ofendis, ĝi despli levis sian puran voĉon por moderige revoki humanajn prudenton kaj saĝon. Nia ideo montris sin majesta super vulgaraĵoj ĵaluzoj kaj ambiciaj intrigoj eĉ de propraj anoj, kaj ne tuŝeblis de ĉiuj provoĵ semi malkon-

kordon en si mem.

La sepdek jaroj: ili certe prezentas nian plejajn fierindon kaj maldebeton. Ne kontestebla en la kultura historio la fakto restas ke lingvo konceptita de benita homo ekspiris kaj kreskadis jam pli ol homan aĝon. Kaj ni vidas ja signojn ke ĝi eĉ multe pluvivos en lumo kaj rekono. Ĉar ne nur por ni Esperantistoj - por ĉiu kulturano - tiu verko nature signifas miraklo, kiu meritas altan estimon kaj admiron. Ĝi memorigas pri Sanskrito, ĝenia kreo de l'Hinda pastro Panini antaŭ kvar jarmiloj, aŭ pri la Luthera bibliotraduko, la nasko de l'Germana. Jen, se la mondon nun trafus Pompeja sorto kaj se arkeologoj pli poste elfosus la Esperantan fundamenton, tiuj posthomaj certe ĝin konsiderus la plej alta atingiĝo de nia infana raso. (Kaj por ĉiu lernanto ĝi estus kiel Eŭklid tre ĉagrena.)

La nimbo de praa maljuno ankoraŭ ne ornamas Esperanton; por lingvo la sepdeko nur ŝajnas palpebrumo ekde ĝia brilnoveco. Mi ripetas: la sepdek jaroj estas la plej mirinda fakto kiun ni povas ekspozicii. Ni obstinu pluan sepdekon polurante kaj fajlante ĝin. Pacienco estas la vorto preferata de l'Majstro. Esperanto povas atendi; intertempe ni flegu, adoru kaj oferu al ĝi. La fiera festa rigardo

PAUL VERLAINE

Antaŭ 60 jaroj mortis PAUL VERLAINE, la t.n. „malŝelica Lelien” unu el la grandaj nomoj de la franca poezio.

Verlaine travivis agititan junecon. Okaze de akra disputo, li pafis al sia amiko Arhtur Rimbaud, alia fama franca poeto, pro kio li kondamniĝis je malliberejo.

La ĉi suban poemeton li verkis en la Brusela malliberejo de „Petits Car-mes”.

El karcero

Ĉielo, super la tegment',
Kviete bluas;
Folio, sub la eta vent',
Apenaŭ bruas.

Eksonas, en ĉiela blu',
Sonorilaro.
Eksonas, el folia bru',
Birda kantaro.

La vivo, transe, fluas plu,
Simple trankvila.
En paco, transe, zumas plu,
L'urbo proksima,
Dum vi priploras en karcer',
La liberecon;
Dum vi priploras, en karcer',
Vian junecon.

(Libere esperantigita de
H. CASTEL).

malantaŭen ne vantiĝu, sed iĝu prudenta vido antaŭen al la estonta farendo. Kia estu nia laboraga plano por la sekvonta sepdeko?

La unua sepdeko kun rajto notis: rec kaj denove voki en konsciencon ke nia lingvo ekzistas kaj vivas. La sukceso de tiu oftete laŭta ŝtormenergia vokado estas ne kontestebla kaj vaste agnoskinda. La nomon Esperanto jam konas la plej malgranda infano. Ĝi estas en ĉies buŝo. (Tio ne estas vera por Belĝujo. Rim. de la Red.) Tamen ni ne troigu la valoron de tiu fakto. Mi mem antaŭ la konvertiĝo ofte kontaktis esperantistan reklamon. Sed ĝi ne atingis mian konscion, nur mian oreilon.

Kaj mi neniam eĉ nur pensis ke mi okupu min pri la lingvo. Tiel, ĝis kiam amiko donacis al mi verkon pri Esperanto. Nur tiam mi plenkonscie frontis ĝin kaj sentis min devigata formi juĝon pri ĝi. Pro tio restas mia persona revo ke ĉiu homo havu dum sia vivo iam en mano esperantan gramatikon, ĉu estante lernanto ĉu poste. La instruistoj inter ni do prezentas la kasto plej grava kaj plej respondeca, ĉar el ilia sinteno dependas ĉu ni sukcesas demonstri ke Esperanto vere portas en si

Nau Tezoj pri la Eŭropa Lingvoproblemo de d-ro Herrmann

1.
La lingvo estas la plej elstara karakterizaĵo de la eŭropaj nacioj.

Preskaŭ senescepte ĝi sole ebligas al ili propran kulturalan vivon de la aliaj tute apartan. Je tiu esenca trajto ili neniam volos rezigni. Popolo, kiu rezignus je sia lingvo, estus forsbata de la popolo, al kies lingvo ĝi konvertiĝas. Tial estonta eŭropa federacio nepre devas garantii la pluekzistadon de la membroj-nacioj kaj efike protekti la lingvan karakteron de ili, ne nur de la grandaj, sed ankaŭ de la malgrandaj. Tio estos „conditio sine qua non” por la unuiĝo.

2.
Sur nia kontinento la tendenco iras de unulingveco al trilingveco.

En la mezepoko la granda amaso de homoj bezonis kaj scipovis nur sian lokan aŭ gentan dialekton. Dum la nacionalisma epoko ĉiu eŭropano aldone devis lerni la oficialan altlingvon de sia nacia patrolando. La haŝlingva Eŭropo fariĝis la komuna patrolando por ĉiuj siaj enloĝantoj nur kiam ĝi havos simile al la unuopaj nacioj komunan lingvon, kiu ebligas al ĝiaj civitanoj senĝene moviĝi sur la tuta kontinento kaj ne plu senti sin fremduloj transpasinte la landlimojn. Krome la moderna formo de komerco, trafiko, turismo kaj telekomunikado necesigas la forigon de la lingvaj baroj kaj favoras la kreadon de la tria lingvo por la ĝenerala uzo.

3.
Eŭropa federacio sen komuna lingvo nek povus efike funkcii nek estus sufiĉe solida kaj forta.

Jam pro praktikaj kialoj neniam

la forton por ŝanĝi la interpopolan rilaton kaj por gvidi la homan karakteron al kompreno. Ni ĉie ajn povas senti la tendencon al internaciismo; do kiel la unua necesas la instruado de internacia lingvo.

Nia agado ofte estis fiksita de individuaj intereso kaj deziro. Sed ni devas ne nur tiom per Esperanto, multe pli por Esperanto alceli.

Ni submetu nin ĉiujn al tutkomuna, zorge projektita aktiveco de potenco tutesperantistaro. Ĉiu devas fariĝi nur malgranda sed despli fidinda radeto en granda movada maŝino. Tio estas tre domaĝa, mi konsentas, tamen tion postulas nia normteknika tempo kiam nur laŭ nombro kaj efiko imponaj entreprenoj sukcesas. Niaj fortradaj povas nur fokusitaj penetri la volvojn de apatio kaj inerteco. La vivo de ĉiu el ni estas por la granda

estos eble, en federaciaj institucioj (registaro, parlamento, administrado, armeo ktp.) apliki samtempe ĉiujn lingvojn de la membroj-nacioj; ĉar pli ol dudek diversaj lingvoj estas parolataj en Eŭropo okcidente de la limoj de la Sovetunio. Eĉ per la plej bonaj teknikaj rimedoj oni ne povus superitajn lingvan haŝon. Precipe en la armeo tiu situacio estus danĝero por la sekureco de Eŭropo.

4.
Komuna lingvo estas necesa kiel psikologia ligilo kaj kiel edukilo al eŭropa solidareco.

Se mankus komuna lingvo, la disigaj fortoj de la naciaj lingvoj restus efikaj. Komuna lingvo paralizus la partikularismajn tendencojn de la naciaj kulturoj, malfermus vojon al nova komuna lingvo-kulturo, vekus eŭropfederacian solidarecon kaj donus okazon, eduki la junularon al vere poreŭropaj sintenado kaj pensmaniero. Do, komuna lingvo ludus la saman rolon kiel la naciaj altlingvoj rilate al iliaj dialektoj nur kun la escepto, ke ĝi ne limigus la tradiciajn rajtojn de ili sur la naciaj teritorioj.

5.
Kiel komuna lingvo ne taŭgas nacia lingvo.

La ĝisnunaj klopodoj ĉe la Eŭropa Konsilantaro evidentiĝis, ke neniu nacia lingvo havos iun ŝancon fariĝi la komuna en Eŭropo. Ili ĉiuj estas tro malfacile elerneblaj por komuna uzo en la ĉiutaga vivo. Krome tia solvo signifus ne nur la lingvan, sed ankaŭ la kulturalan hegemonion de la privilegiita nacio; krome kun tio estus ligitaj multaj aliaj precipe ekonomiaj a-

Esperanto, kiu jam vivas sian nepre propran vivon, ne pli ol sekundeto. Se ni tion atentigas kaj respektas la devizon de U.E.A. (=unueco estas forto), la sekvonta sepdeko nin certe proksimigos al nia celo. Tion ni ŝuldas al la honoro de nia Majstro kaj la bono de niaj infanoj.

Sepdekon rezistas jam nia bastiono de vero, fido, tolero. Por ni tio estas merita rekono al nia longjara espero. Modelo de l'ordo, kompreno, sindono estas al ni Esperanto. Sed ankaŭ por ĉiu la nepra admono esti senlaca batalanto. La Majstro dediĉis al homoj, helpeme, la verkon, kompate, sen limo. Ĝi vivas, kreskadas kaj floras; poeme karas al nia animo. Sen iu malkulo ĝi rajton postulas ĉie prediki toleron. Kaj ĝia ideo nin fajre stimulas venki la „sangon kaj feron”.

Peter Beiswanger.

El La Flandra Poezio

LA EDZIGO

WILLEM ELSSCHOT

(A. J. de Ridder — 1882)

Li rimarkante, kiel nebulo de tempdaŭr' estingis la fajrerojn okulajn de l'edzino, trafendis fruntan, igis la vangojn en ruino, — ĉagrene sin deturnis, mordata de bedaŭr'.

Li tiris sin ĉe l'barbo, blasfemis kun lament', sin taksis perokule, sed ja ne plu deziris, la peko grandioza al damna dev' transiris kaj ŝi rigardis kiel ĉeval' en mortatend'.

Sed ŝi ne mortis, kvankam infera lia buŝ' medol-elsuĉis ostojn, kiuj ŝin tamen portis, ŝi ne kuraĝis plendi, demandi, eĉ ne vortis, nur tremis, sed ŝi vivis kaj sanis malgraŭ puŝ'.

Li pensis: mi mortbati ŝin, post brulig' de l'dom' forlavi mi la ŝimon de la rigida piedo, trakuru fajron, vadu tra akvo al posedo de nova amatino en iu region'.

Sed li ne ŝin mortbatis, ĉar intr' rev' kaj ag' la vojon baras leĝoj kaj io nefarebla, melankolio ankaŭ, neniel klarigebla, venanta ĉe la dormo je l'fino de la tag'.

Grandiĝis la infanoj dum jarsinsekva plekt', kaj vidis ili viron, lin nomis ili patro — senmove kaj silente en la fajreja kadro sidantan, — malbeninda, terura laŭ aspekto.

trad. Hector Vermuyten.

La Ĝardenisto kaj la Morto

de pro d-ro Pieter Nicolaas Van Eyck (1887-1954)
el la versaĵaro „Voorbereiding” (1926)

Hodiaŭ frue mia ĝardenisto mian domon Enkuris, pala pro terur': „Sinjor', sinjor', momenton!
En la rozejo tie tranĉis mi post branĉo branĉon;
Rigardis tiam malantaŭen: vidis mi la Morton!
Ektimis kaj rapide mi eniris la vojeton:
Ankoraŭ ĝuste vidis lian minacantan manon.
Foriri lasu min, sinjor', kaj donu tuj ĉevalon:
Mi certe antaŭ la noktig' atingos Hispahanon”.

Hodiaŭ posttagmeze — li jam estis for de longe —
La Morton, jen, ni mem renkontis en la cedroparko!
„Pro kio”, mi demandis — ĉar atendis li silente —
„De vi matene estis minacata la servanto?”
„Mi ne minacis vian ĝardeniston”, ridetante
La Mort' respondis. „Mia gest' nur venis pro surprizo
Ankoraŭ trovi laboranta tie ĉi matene
La homon kiun nokte prenos mi en Hispahanon”.

Tradukis Luc De Marré

vantaĝoj. Tio ne estus tolerebla. Tial la angla-franca dulingveco devis fias-ki. La nacioj nepre volas esti kaj resti egalrajtaj ankaŭ rilate al la lingvo-aplikado. Sincera eŭropfederalista politikisto respektos tiun volon.

6.
El tio sekvas:
La komuna lingvo por Eŭropo devas esti

1e) internacia
por garantii strikte politikan neŭtralecon kaj la saman ŝancon al ĉiuj eŭropanoj egale kiun gepatran lingvon ili parolas;

2e) moderna sintezo de la eŭropaj lingvoj ĉar ĝi apartenu al ĉiuj nacioj kiel eŭropa altlingvo;

3e) en la lernejoj ĝis perfekta scipovo elernebla.

Nek en popol- nek eĉ en mezlernejoj fremda nacia lingvo estas elernebla ĝis kontentiga kono. Tamen nur se la granda amaso de la eŭropanoj — ne nur la malgranda elito — povos senĝene interkompreniĝi, la problemoj estos vere solvitaj. La moderna ekonomia vivo necesigas la migradon de laboristoj el unu lando al la alia. La dudekjarcenta trafiko amase interkontaktigas simplajn homojn el diversaj landoj. En la armeo inter simplaj soldatoj kaj oficiroj de diversaj nacioj bona kamaradeco ek-estigos nur, se ili ne estos malhelpataj per lingvaj obstakloj. Do ni bezonas lingvon, kiun oni povas senpene majstri buŝe kaj skribe post sukcesa vizito de la kutimaj popol- aŭ mezlernejoj.

7.
Tia lingvo jam ekzistas en Esperanto

Esperanto ne estas neelprovita lingvo-projekto, sed — la faktoj pruvas tion — internacia, vivanta lingvo. Ĝi estas minimume kvinoble pli facile elernebla ol ĉiu nacia lingvo. Ĝi estas disvastigita ne nur sur la eŭropa kontinento, sed eĉ sur la tuta terglobo. Ĝi posedas internacian organizon, konsiderinda propran gazetaron, riĉan originalan kaj tradukan literaturon. Ĝi estas parolata kaj aplikata de laboristoj same kiel de universitataj profesoroj. Miloj da homoj ĉiutage uzas Esperanton en siaj internaciaj rilatoj, korespondado kaj kongresoj.

8.
La enkonduko de Esperanto estas ebla tuj sen temporaba preparo.

Pro sia logika strukturo, facila prononcado, fonetika skribmaniero kaj internacia vortradikaro ĉiu lingvo-sperta instruisto povas komenci instruadon de Esperanto jam post preparaj studoj de nur kelkaj semajnoj.

Cetere per radio-sendaĵoj oni facile

povus teledirekti la instruadon, zorgi pri unueca kaj korekta prononcado kaj akceli la lernadon flanke de plenkreskintoj. Tiamaniere Esperanto kiel komuna lingvo en Eŭropo jam nur unu aŭ du jarojn post la oficialaj agnosko kaj enkonduko povus esence kontribui al la unuiĝo de Eŭropo.

9.

Do, Esperanto prezentas la idealan solvon de la lingvo-problemo por Eŭropo kaj samtempe por la tuta mondo,

ĉar je plej malmultaj penoj kaj kostoj ĝi garantias la plej rapidan sukceson kaj la plej grandan efikon.

HUNDOBATISTOJ

En 1954 la ĵurnaloj informis, ke en Vieno estas instalita, kiel dependaĵo de hundovendejo, „hundobufedo”, kie la karaj boĵuloj malsataj kaj soifaj pro longedaŭra butikumado kun la mastrinoj, senkoste estas regalataj.

Ankoraŭ plibonajn zorgojn ĝuas la loĝantoj de la hundurbeto Laŝo en norda Hindujo, fondita de la angla vegetarano John Wickendham Laŝett, kaj nomita laŭ li. Li fondis ĝin post la morto de l'edzino, venenita de viando, mallonge antaŭ la morto de plej amata hundo. Miloj da tiuj bestoj ĉiusepecaj, ĉiurasaj tie loĝas en miniaturaj domoj laŭ rektaj stratoj, placoj, lagoj kaj parkoj. Ili havas du zorgantojn kaj urbestron, la zoologon Bill Sommerset, kies malfacila tasko kaj devo estas konverti la tutan loĝantaron al la vegetarismo...

Estas mirige kiom la hundo, krom la ĉashundo, kiu ĉiam ĝuis la protekton de la aŭtoritatuloj, nuntempe estas ĉie alte taksata je la homo, esceptante Rusujon, kie laŭdire oni ne rimarkas hundojn (kaj katojn) sur la stratoj, ĉar oni simple ilin malhavas, kaj precipe la sudamerikajn landojn, kie la hundoj vagas en la ĉefurboj, ne malofte kaŭzantaj rabion. Antaŭ nelonge ni legis, ke en Kosta Riko okazis vera epidemio, kaj ke sesdeko da personoj estis danĝere morditaj el kiuj du mortis. Tio nin kondukas al plena mezepoko.

Diogeno preferis la hundon super la homo kaj tial mem estis nomata „hunda homo”, sed la germanoj taksis la hundon eĉ tro malalta por esti oferebata al la dioj. Tra la historio la kvarpieduloj de la strato estas konsiderataj vera plago, inkluzive la porkoj, kiuj same facile trovis sian manĝaĵon en la abundaj defalaĵoj, formantaj tiam la efektivan „pavimon” de la vojoj. Oni precipe timis la hundojn en la urboj pro la danĝero por la publika sano, en tempo kiam ankaŭ la pesto regule furiozis, ĝis la dua duono de la 17a jarcento. Kaj la hundoj ne nur mordis la pasantojn sed ankaŭ difektis ilian havaĵon. Ĉi ĉio, oni timis, evitigus la urbojn al la fremdaj komercistoj.

Kaj jen sursceniĝas la t.n. „hundobatisto”, enoficigita por draste malaperigi la boĵbestojn kaj mordulojn! Fakte estis patentita hundekzekutisto, kaj foje oni serĉis la malofteajn kandidatojn inter la vera kanajlo.

En la flandra urbo Gento oni trovas en la urbokontoj de 1334—35: „pagita al Janne Alaert kaj Jan Mase, hundobatistoj, por iliaj bastonadaĵ servoj dum sep semajnoj...” En 1512 oni tie dungis „specialiston kaj ordonis, ke neniu je puno malhelpu lin en la plenumo de lia tasko. En 1523 oni

dungis duan kaj se ili mankis, estis la ekzekutisto kun helpantoj, kiuj devis transpreni la gravan laboron.

En la nederlanda urbo Dordreĥto, ĉirkaŭ 1450 la hundobatisto estis fia ŝtelisto al kiu oni antaŭe tranĉis parton de la orelo. Tiam regis, nek por homo nek por besto, multe da humaneco kaj Miĥaelo van Loven — tiel li nomiĝis — sendube venĝis al siaj viktimoj la malaperon de sia kapornamaĵo... Cetere, ĉu la aŭtoritatuloj mem, kvindek jarojn antaŭe, ne estis ordonantaj la hondoposedantojn, ke ili fortranĉu antaŭpiedon al siaj (ne ĉas-)hundoj?! Kaj en 1466 en sama Dordreĥto oni ĵetis ĉiujn hundojn en ŝipon por esti ekzilitaj, esceptante la rapidhundojn kaj la „ĉambrohundetojn”, kondiĉe ke ili ne venu sur la strato.

Estis en la 16a jarcento ke oni, finfine lerninte de la pesto, komencis pliatenti la publikan higienon. Ni legas ke en 1553 la konsilantaro de la germana urbo Frankfurt, instrukciis al la urbadministranto, ke li subtenu la „hundobatiston” en la mortigo ne nur de hundoj sed ankaŭ de porkoj, kiuj multnombre vivis sur la publikaj vojoj, tie vekante naŭzan odoron. Ke tiuj ĉi lastaj ankaŭ malsekurigis la cirkuladon, jam spertis en 1131 Ludoviko la Dikulo, kiam lia dekkvinjara filo perdis la vivon en Parizo, fare de porko kiu faligis lian ĉevalon.

Hundobatisto ja tiam estis internacia profesio kaj la nomo transiris al pedelo, ŝargita per la forpelo de hundoj el la preĝejoj, kie ili longtempe estis tolerataj, kiel ankaŭ atestas tiutempaj pentraĵoj. En 1611 oni trovas en Genta kont-enskribo: „pagita por farado de tri viroj por peli la hundojn el la preĝejo...” En 1775 oficis tie en Sankta Bavo-preĝejo eĉ tri hundobatistoj, fakte elpelistoj, unu por ĉiu pordego de la konstruaĵo.

Se en 1840 la antverpena urbestro ankoraŭ mortbatigis la hundojn, kiuj dumsomere libere kuris nebuŝumitaj, en nuna jarcento la urboj nur konis la „hundokaptiston”, la malaperiganton de la „stratraso”. Sed intertempe la deka hundo jam delonge trovis varman lokon en la koro de la mastroj, precipe post 1800, al kio tra la jarcentoj noble kontribuis poetoj kaj verkistoj, kiel Baudelaire, Dante, Dickens, de la Fontaine, Kipling, Thomas Mann, Axel Munthe, Shakespeare kaj multaj aliaj.

Do la nomo „hundobatisto” modifiĝis, kiel ni vidis, en tiu de „hundokaptisto”, du nomoj kiuj en la diversaj lingvoj havas ekivalenton, kaj parto de la lingvotrezoro memorigas ankoraŭ pri la malfeliĉa sorto de la hundo, per insultvortoj kaj esprimoj.

„Por hundon dronigi oni nomas ĝin

„Sciencaj Studoj”

GRAVE:

La „Internacia Scienca Asocio Esperantista” aperigos sub tiu titolo libron de ĉirkaŭ 250 paĝoj entanantan plej diversajn studojn de nur eminentaj samideanoj kun absoluta kompetenteco pri sia fako. La eksterordinara graveco konsistas en tio ke ĝi ne kontraŭdireble pruvos la taŭgecon de nia lingvo por ĉiuj sciencoj kaj ke do ni povos kun fiero montri ĝin al la eksterstaranta mondo. Sed ne nur la Esperantistoj devas aĉeti ĝin; ili ankaŭ devas instigi por ke sciencaj bibliotekoj kaj similaj institutoj aĉetu ĝin. Ili ja poste ne ruĝiĝos! Tion la eldonantoj garantias! Laŭ aspekto kaj laŭ enhavo ĝi estos ĉiurilate inda libro.

Favoreprezo se vi nun tuj mendas: 140 Fliveras : Belga Esperanto-Instituto Poŝteĉekkonto : 326851.

INTERESAJ KORESPONDADRESOJ

18 jara knabo deziras korespondi kun Flandra, Valona aŭ Holanda knabino: Radi Nedelčev Radev str. Georgi Kirkov 12 Kolarovgrad, Bulgarujo.

21 jara studento Ivo Sedlaček nadrazi ĉp. 54 TEPLICE nad.Met. Tsjeĥo-Slovakije.

Tasso Ivanov str.Stefan Karadĝa Nr. 17 KAZANLIK Bulgarije deziras korespondi kaj interŝanĝi bildkartojn revuojn kaj Esperanto-gazetojn.

D-ro Kussinszky Kornel Landler utca 19 PECS Hongarije, 45 jara ĵurnalistino kiu volas korespondi prefere kun juristo; deziras ankaŭ interŝanĝi ilustritajn poŝtkartojn pri urboj, monumentoj, famaj konstruaĵoj ktp.

S-ro Samuel dos Santos Guerra Rua Nene Freitas 402 Caixa Postal 8 PI-RAJU E.F.S. Sao Paulo Brazilio.

Filatelisto kiu volas interŝanĝi poŝtmarkojn.

S-ro Andrej Aleksandr. Semonov JAROSLAVL P.O. Poste restante U.S. S.R. (Rusland), literaturisto kiu bone konas nian literaturon kaj kiu volas korespondi pri tiu temo kaj ankaŭ interŝanĝi artajn bildkartojn.

(Sekvo sur p. 46)

rabia” diras nia proverbo, same kiel la franca, sed alingve ĝi ankaŭ tekstas: „kiu hundon bati volas, facile ja bastonon trovas”, kaj tio en la praktika vivo ĉiutage, volonte trovas kaj ĉiam trovas metaforan uzon.

TYNEVERUM.

MI TRAPASIS LA SUEZ-KANALON

Kvankam ni ne estis la unua nederlanda ŝipo, kiu trapasis la Suezkanalon, ni tamen estis unu el la unuaj kiuj ricevis la ordonon uzi la kanalon.

Fakte ni estis irontaj ĉirkaŭ kabo de la Bona Espero, sed kiam la ŝipo estis inter Las Palmas kaj Dakar (kie ni bunkros) la kapitano ricevis radiotelegramon, en kiu estis ordonata reiri al Las Palmas (Grand-Kanario) por bunkri kaj poste veturi al Port Said kaj iri Indonezian laŭ la Suezkanalo.

Ne estas mia intenco priskribi la historion de tiu majstra laboro de Ferdinand de Lesseps. Nur surpaperigi la unuajn impresojn miajn mi volas.

Estas dimanĉmateno kiam ni alvenas ĉe la eksterbuo antaŭ la moleoj. Post iom da atendado venas la pilotboato kaj arabegipta piloto surgrimpas la pilotŝtupareton. Laŭ liaj indikoj ni ekveturas al la haveno de Port Said. Ni iras inter la moleoj sur kiuj staras kelkaj pafkupoj kaj betonplataĵoj sur kiuj staras mitraliloj. En ĉiu tia militistujo troviĝas grupo de soldatoj kun gvidanto. Je la fino de la triborda moleo staras soklo. Sur ĝia unu flanko mi povas ankoraŭ legi „Ferdinand de Lesseps”. La supraĵo estas ege domagiĝa.

Ni havos belan elvidon al la urbo. Grandaj konstruaĵoj videbliĝas: moskeoj, bankoj, magazenoj, ĉielskrupuloj, „flat”-loĝejoj kaj ordinaraĵoj, preskaŭ ĉiuj en blankaj, flavaj kaj okraj koloroj. Vere rava panoramo.

Sur la akvo svarmas centoj da boatetoj. Alproksimiĝante al la urbo mi vidas ke inter tiuj belaj konstruaĵoj kaj ĝardenoj staras ankaŭ la domoĉoj de la malriĉaj araboj. Urbo de kontrasto. Sed bombitajn domojn mi tute ne vidis. Nur unu ruina domon mi rimarkis. Eble pro bombado. Sed apud la haveno nenio estis bombita aŭ kaduka kaj se en la interna parto falis bombo(j), tamen ankaŭ tie la domoĝo estas nur malgranda, alie la efiko estus estinta pli bone videbla. La plej granda domoĝo, kiun mi vidis, estis la resto de la statuo de Lesseps. La tuto faris sufiĉe prosperan impreson al mi.

Ĉe la eniro de la haveno kuŝas tribordflanke militŝipo. Sur ĝi oni ekzercas sin en la direktado de kanonoj. Unu sekvas nian ŝipon.

Babordflanke kuŝacas en flanko haveneto subigita ŝipo. En la haveno mem kuŝas kelkaj ŝipoj, i.a. nederlanda, itala kaj rusa. Ni preterpasas la urbon kaj iom malantaŭ ĝi ni ligiĝas por atendi la forirtempon de la ŝipoj. Tuj surŝipiĝas havenaŭtoritatuloj. Armita soldato ekdeĵoras ĉe la ŝtuparo kaj dua baldaŭ venas, ĉar ni havas Francon kaj rifuĝintan Polon surŝipe. Ĉiujn loglibrojn oni forportis urben

por kontroli ĉu ni ne vizitis iam antaŭe Israelon. Same oni kontrolis ĉiujn kargopaperojn ĉu ni ne transportas kargon por aŭ el Israelo.

Ankaŭ multaj arabaj vendistoj venis kun siaj remboatetoj al la ŝipo, kvazaŭ muŝoj al la mielo. Inter ili estis ankaŭ Said kiu estas tre konata sur nederlandaj ŝipoj kaj kiu parolas la nederlandan perfekte. Ĉion ajn oni povos aĉeti, laŭ araba maniero. Por tranĉilo ili postulas 25— gld. Ĝi vendiĝas por gld. 2,50. Belaj kamelledaĵoj kiel pufoj, paperujoj ktp. plej bone vendiĝas. Nenio estas rimarkebla de iu streĉiĝo aŭ maltrankvilo. Nur el la paroloj de la araboj surŝipe oni povos konkludi ke oni timas ege Francujon kaj ankaŭ Israelon.

Kiam la tempo por forveturi alvenas, la Egiptoj forlasas la ŝipon. Ni nun havas alian piloton, blankegipto. Vere tre afabla persono, kiu bone parolas la anglan lingvon.

Jen ni eniras la kanalon mem. Per rapideco de 7½ marmejloj hore ni veturas tra la Suezkanalo. En nia aro troviĝas 13 ŝipoj, i.a. angla germana kaj norvega. Tribordflanke laŭiras la kanalon fervojo kaj ŝoseo. Je iuj distancoj patroladas soldatoj ĉe la kanalo. Kelkfoje sporadaj kabanoj kaj Suezkanalkompanidomo staras apud la kanalo. Plue nur dezerto, kaj babordflanke tute forlasita dezerto. Ne, tamen ne tute forlasita: Tie oni laboras! Oni plilarĝigas tie la kanalon. Tial oni devas transporti la sablon el la kanalo surborden. En la brulanta suno la Araboj plenigas permane aŭ ŝovelile korbon aŭ tukon, metas la korbon aŭ la tukon per la 4 finaĵoj sur la dorson kaj grimpas piede kaj mane, duone rampante el la koto sur la 3 ĝis 4 metrojn altan bordon por malplenigi la ujon ĉe la alia flanko kaj poste reiras por denove plenigi la ujon. Tiu laborego daŭras ĝis sunsubiĝo, ankaŭ dimanĉe, kontraŭ nur malalta mongaĵono. Post proksimume 4 horoj ni alvenas ĉe la „Preterpaskanalo”. Tie ni ligas nian ŝipon same kiel la aliaj ŝipoj de nia aro. Ĉe tiu loko la kanalo dividiĝas en 2 kanalojn, la Suezkanalon mem kaj la flankan kromkanalon, la Preterpaskanalon. En unu la aro atendas la alian aron kiu venas el la alia direkto, por ke ĝi preterpasu, ĉar la kanalo estas tro mallarĝa por ke povu preterpasi unu la alian en la kanalo mem. Ni devas atendi ĝis la vespero, kiam jam estas mallume.

Kiam ni tie atendadis subite ekaŭdiĝis motorbruo sur la ŝoseo. Tie en la mallumo aperis longa vico de pezaj kirasaŭtomobiloj, kiuj ĉiuj trenas kanonojn, irantaj en la direkto al Suez. Kvankam ili veturas en la mallumo, la antaŭlampoj de la aŭtomobiloj lumigas la antaŭiranton tiel ke oni bone povas vidi la kanonojn. Dudek minu-

tojn almenaŭ daŭras tiu densa vico. Poste mi demandas la piloton pri tio. „Mi nenion vidis, mi iom dormetis”, li respondas.

Post la trapaso de la lasta ŝipo de la alia grupo ni daŭrigas nian vojon. Ĉe Ismailia, la tre moderna kaj luksa pilotvilaĝo duonvoje, ni interŝanĝas la piloton. Du rusaj kanalpilotoj transprenas la pilotadon.

Je malgranda distanco post Ismailia ni vidas inter la arboj saman vicon de militmaterialo kiel ni jam vidis ĉe la Preterpaskanalo, sed ne tiel longan kaj ĝi nun veturas en la kontraŭa direkto. Ĉu oni ĉiuvespere veturigas tiun vicon ire revene laŭ la kanalo por doni al la kanalizantoj la impreson ke Egiptujo havas grandan militforton? Aŭ ĉu ĝi estas alveno de vera nova militmaterialo?

Sen iu ajn malfacilaĵo ni pasis la Suezkanalon por eniri la varmegan Ruĝan Maron (42o C.).

K. Ruig,
navigisto v.s. Aalsum.

Komuniko

ANTAŬ DUDEK JAROJ la bruderhofanoj en Germanujo devis subite forlasi la komunumon ĉe la Rhön, pro la hitlera persekutado. La gevojroj kaj infanoj, kiuj vivis en komuna gefrateco laŭ la maniero de la unuaj kristanoj, sukcesis transiri la landlimon en Nederlandon kaj atingis Anglujon, kie ili konstruis la bruderhofan komunumon apud Swindon. Dum tiuj dudek jaroj ili fondis novajn komunumojn en Paragvajo, Urugvajo kaj Usono dum multaj el diversaj nacioj atingis al ili.

Nun ili serĉas novajn bienojn en Anglujo kaj Germanujo por etendi sian ateston al tia vivmaniero, en kiu neniu ricevas rekompencan, sed laboras laŭkapable kaj ricevas laŭbezono, en la spirito de paco kaj gefrata amo. En Usono ili jam trovis lagbordan hotelon apud Pittsburgh, kie ili daŭrigos la fabrikadon de lernejoj edukiloj, nun faratan ĉe la bruderhofs „Woode-rest” apud Novjorko. En Anglujo, ili serĉas taŭgan bienon apud Londono por la dua tiulanda komunumo, kie multaj interesatoj povos viziti kaj partopreni la vivon kaj laboron. En Germanujo ili ankaŭ serĉas pli apudurban komunumon; ili nun havas malgrandan komunumon ĉe Bad Brückenau.

Por pli vaste sciigi la Esperantistojn pri la bruderhofs idealo, ili eldonas regulan novaĵleteron en Esperanto, kiun ili volonte sendos al ĉiuj petantoj. (Adreso: Societo de Gefratoj, Bromdon, BRIDGNORTH, Shropshire, Anglujo).

Interesaj leteroj de Esperantistoj estas tradukatoj kaj transsendataj al ĉiuj komunumoj por komuna legado dum manĝoroj.

BELGA KRONIKO

Prezidanto: S-ro Maur. JAUMOTTE, De Bruynlaan, 44, Wilrijk.
Vicprezidanto-Kasisto: S-ro J. Soyeur, 91, Rue du Chêne, Seraing.
Vicprezidantino: S-ro J. Plyson, 185, rue Jourdan, Bruselo.
Generala Sekretario: S-ro H. Sielens, „Internacia Marista Domo“, Falconrui, 21, Antverpeno.
(Poŝtĉeknumero: R.B.L.E.: 13.37.67)

ANTVERPENO

Esperanto-Grupo „LaVerdaStelo“
(Poŝtĉeknumero 726.54)

La 7an de junio, la parolata ĵurnalo havis sian kutiman sukceson. Kunlaboris en ĝi S-ro L. De Marré, kun astrologia artikolo. F-ino Fr. Jaspaers, S-inoj F. van den Neste kaj R. Lecat kaj S-ro Balleux, kiu raportetis pri sia vojaĝo Munhenon.

La 14an, F-ino Cl. Peeters, plej humore plene, S-ro Luc. De Marré, kun kritikema spirito, kaj S-ro J. Verstraeten raportis pri la 5a Beneluksa Kongreso, okazinta la 8an, 9an kaj 10an en Eindhoven.

London, la 17an, finiĝis la perfektiga kurso, gvidata de S-ro Morris De Ketelaere kaj S-ro Luc De Marré kaptis la okazon por danki kaj laŭdi la profesoron kaj transdoni al li, nome de la lernantoj, belajn librojn. S-ro De Ketelaere plej afable dankis kaj S-ro J. Verstraeten esprimis la dankemon de la komitato.

En foresto de la prezidanto, kiu libertempas, kaj sub prezido de S-ro De Ketelaere, estis disaŭdigataj, la 21an, du teatraĵoj: „Ama Duo“, tradukita el la flandra de F-ino E. van der Weken, kaj „La Rompŝtelisto kaj la Fraŭlino“, same el la flandra tradukita de S-ro E. Paesmans. Atente kaj plezure ĉiuj aŭskultis la voĉojn de F-inoj Cl. Peeters kaj E. Van der Weken, kaj de S-roj L. De Marré, E. Paesmans kaj Fr. Schellekens. S-ro J. Verstraeten enkondukis la teatraĵojn; S-ro J. Montmirail respondis pri la aparatoj kaj la sondekoraj kaj S-ro De Ketelaere varme dankis ĉiujn.

La 28an okazis amuza vespero kaj la 5an de julio sekvis parolata ĵurnalo, kun la ĉiam interesa astrologia rubriko de S-ro L. De Marré.

La 12an, tiu ĉi lasta organizis filman vesperon sub la signo de la „Eŭropa Movado“, kies sekretario li cetere estas. Ses kolorigataj filmoj estis prezentataj, el kiuj du kun esperanta komentario, aranĝita kaj aŭdigata de la organizanto mem. Kunlaboris al la teknika efektivigo S-roj R. Van Eynde kaj J. Montmirail. S-ro Jaumotte varme laŭdis S-ron De Marré kaj ties kunlaborintojn.

La 19an, trideko da gemembroj, sub gvidado de S-ro E. Paesmans, vizitis malnovan kvartalon de la urbo. Favana vetero, lertaj klarigoj kaj specialaj enirpermesoj por

diversaj vidindaĵoj igis tiun promenadon, ne nur plej agrabla, sed ankaŭ tre instrua. Dum lasta horeto pasigata en trinkejo... en grenejo, S-ro Jaumotte kore dankis la fidelan kaj tiel bonvoleman membron S-ron Paesmans.

La 26an okazis lekiskona vespero kaj dimanĉon, la 28an, ekskurso al Rupelmonde; kunvenigis 37 gemembrojn ĉe la Steen-pon-tono, por la ŝipveturado sur la Skeldo. En Rupelmonde estis vizitata la nov-kreita vidindaĵo „Skaldiana“, kun serio da panoramaj pejzaĝoj rilatantaj al la Skeldo, de ĝia elspruĉo sur la altaĵo de St. Quentin ĝis la nederlanda landlimo. Kaj vespere, je la 8a, ĉiuj denove persipe revenis, plej kontentaj pri la ekskurso, al Antverpeno.

La 2an de aŭgusto, okazis la kutima parolata ĵurnalo kaj la 9an estis antaŭvidata amuza vespero, kiun prizorgis S-ro J. Verstraeten, kaj kiun ĉeestis, kun sia fratino Yvonne, malnova membrino de la grupo S-ino Gaby Coventry-Van der Veken, de longe loĝanta Anglujo.

Familia Vivo**Edziĝoj**

Plej korajn gratulojn ni direktas al la du junaj geedzaj paroj G-roj J. Vinck-Ameryckx kaj Walter Van Nereaux-Ameryckx kaj al ties gepatroj, ankaŭ bonaj gemembroj: G-roj Karel Ameryckx kaj G-roj J. Van Nereaux, okaze de la duobla geedziĝo kiu okazis en Merksem meze de junio.

Ke Mimi, Jeanneke, Jozef kaj Walter longe vivu en plej feliĉaj kondiĉoj!

Same koraj gratuloj iras al G-roj Hector Vermuijten-Lacroix, okaze de la edziĝo de ilia filo Hugo, la 9an de Julio, kun F-ino Rit Fremau.

Naskiĝo

Por la kvina fojo jam nia bona amiko S-ro Morris De Ketelaere avigiĝis per la naskiĝo de dua filneto Ingrid, en la hejmo de G-roj Carlos Tytgat-De Ketelaere. Ni ĉiujn kune kore gratulas... ankaŭ la geonklojn!

Programo de la venontaj kunsidoj

Ĉiuvendrede en „Witte Leeuw“, Frankryklei 4, je la 20a 1/4 (1-a etaĝo).

Septembro: la 6an: Parolata ĵurnalo; la 13an: Parolado kun lumbildoj de S-ro Maur. Jaumotte, pri „Impresoj pri Hispanujo“; lun-

G. FAES

16, Schoenmarkt, 16
ANTVERPENO

— Por via MUZIKO
RADIO kaj GRAMOFONO

don, la 16an: Komenciĝo de ELEMENTA KURSO en Belgiole 99, je la 20a horo: la 20an: Radiofona teatraĵo; la 27an: Parolado de S-ro H. Sielens, pri „Mia Vojaĝo al Usono.“

Oktobro: la 4an: Parolata ĵurnalo.

BRUGO**Bruga Grupo Esperantista**
(Poŝtĉeknumero 4835.33)

La 11an de junio estis vigle raportata pri la ĵus finiĝinta Beneluksa kongreso de Eindhoven fare de la partoprenintoj: Ges-roj kaj F-ino Poupeye, S-ino kaj F-ino Vermeersch, S-ro Jacques Vermeersch kaj S-ro Fernand Clauwaert.

Dum la kunveno de la 18a junio, la prezidanto, S-ro Ch. Poupeye, transdonis al la grupa kasistino, F-ino Is. Van Parys, la diplomon kaj la premion de la fondaĵo Jen-nen, kiujn li ricevis por la grupo dum la kongreso de Eindhoven. Tiokaze li esprimis dankojn al la vigla kasistino, kiu aktive kunlaboris al la pasintjara progresigo de la grupa membronombro.

Dum la kunveno de la 25a de junio, F-ino Y. Poupeye, ĵus reveninte el Italujo, donis kelkajn freŝajn impresojn pri sia vojaĝo.

La du lastaj lecionoj de la elementa kurso estis donataj dum la kunveno de la 2a aprilo. Sekvis interparolado pri libertempaj proponoj.

Parolata gazeto estis eldonata dum la kunveno de la 9a de julio, kun interesaj kontribuoj de F-ino M. Willems: De kie devenas la vortoj „de mil kaj unu noktoj“, „Humorajoj“ tradukitaj de la nova membro S-ro R. De Buyser kaj „Krucvortenigmo“ prezentata de S-ro Ch. Poupeye kaj komune solvata. Post tio sekvis ankoraŭ legado el la „Ruĝa Broŝuro“.

Tiu lasta aktiveco estis findaŭrigata dum la kunveno de la 16a de julio, post kio S-ro R. Behaeghel gvidis interesan konkurson sub titolo „Turismo“.

La 23an de julio, pro libertempo kaj ne-disponebleco de la kunvenejo, ne okazis kunveno.

La kunvenoj de la 30a de julio kaj de la 6a de aŭgusto estis malmulte ĉeestataj pro

LES ENTREPRISES

DERKS

226, Rogierstrato, BRUSELO

Tel.: 15.19.92

Entrepreno de
KONSTRUAĴOJ

libertempado de pluraj gemembroj kaj lastfoje ankaŭ pro la samtaga prezentado de la fama ludo de la Sankta Sango.

La grupa sekcio de Sint-Michiels daŭrigis siajn interesajn kunvenojn sub gvidado de S-ro R. Behaeghel, la unuan kaj trian lundon de ĉiu monato.

Programo de la venontaj kunsidoj:

Ĉiumarde, je la 8a vespere, a) EN LA SOMERA KUNVENEJO „CONCORDIA“, Zuidzandstraat 5, (tel. 366.24). b) ekde la 17a de septembro: EN LA GRUPA SIDEJO „GOUDEN HOORN - CORNET D'OR“ Simon Stevinplaats 2, (tel. 314.59).

Aŭgusto: 13-an: Portretludado; 20-an: Parolata gazeto; 27-an: Parolado de F-ino G. Wybrouw, „Vojaĝo al Danujo kaj Svedujo“.

Septembro: 3an: Legado de Belga Esperantisto; 10an: Parolado de S-ino S. Verbeke-Vandenbergh: „Pentrata vojaĝo tra ŝtata Francujo“; 17an: en „CORNET d'OR“: a) Nova elementa kurso. b) Interkonatiĝo; 24an: en „CORNET D'OR“: a) leciono; b) portretludado.

Sekcio de Sint-Michiels.

je la 8a vespere, en la komunuma lernejo, la lundojn:

Aŭgusto 19an kaj **Septembro** 2an: Perfektigaj kunvenoj. 16an de septembro: Nova elementa kurso.

GRAVAJ SCIIGOJ: A. Elementaj kursoj:

1e: lundon, 16an de septembro, je la 8a vespere, en la komunuma lernejo de Sint-Michiels, sub gvidado de S-ro R. Behaeghel.

2e: mardon, 17an de septembro, je la 8a vespere en la grupa sidejo „GOUDEN HOORN — CORNET d'OR“, sub gvidado de S-ro Ch. Poupeye.

Verreries et Miroiterie DESMECHT & C°

LA LOUVIERE

S.P.R.L.

Tel. n-roj 223.01 - 223.37

Du esperantaj markoj:

TABULO, por lernejtabeloj; KATOKULO, por signalvitroj.

De nun propagandu kaj varbu por tiuj du kursoj inter viaj parencoj, amikoj kaj konatuloj. Persona propagando superas ĉiujn aliajn.

B. UNUA VINTRA BALO okazos la 12an de oktobro. Skribu de nun tiun daton en via notlibreto kaj tena vin libera.

Familia Vivo**Geedziĝo**

Sabaton, la 20an de julio, geedziĝis S-ro Karlo Poupeye, filo de la prezidanto de la Bruga Grupo kaj de S-ino Poupeye-Hinderickx, kun F-ino Maria Roose, ankaŭ membrino de la Grupo.

Al la junaj geedzoj kaj al iliaj gepatroj, ni prezentas niajn plej korajn gratulojn.

BRUSELO**Esperantista Brusela Grupo**
(Poŝtĉeknumero 12.30.48)

La 24an de Junio okazis la disdono de la diplomoj al la laŭreataj de ambaŭ elementaj kursoj. La Prezidanto, S-ro Jacobs dankis la geprofesorojn, S-inojn Weyn kaj S-ron Jirousek, same kiel ambaŭ ekzamenintojn, S-rojn Castel kaj van der Stempel. La lernintojn li gratulis kaj bonvenigis. Per afablaj vortoj, li preparis ilin al la grupa kaj Esperantista vivo.

Post tio, la Vicprezidantino de R.B.L.E., S-ino Plyson, alparolis la gelaŭreatojn, instigante ilin ne kontentiĝi pri la ĵus akirita bazo, sed daŭrigi la studadon per la praktiko. Plue ŝi transdonis al ĉiuj la diplomon kun premia libro.

Poste, S-ro Dubois dankis sian profesoron S-ron Jirousek kaj donacis al li belan kravatton kun subbrodita verda steleta.

Siavice, S-ro Nanquette danke alparolis S-inojn Weyn en la nomo de ŝiaj gelernintoj kaj transdonis al ŝi oran kajeron kun teksto de S-ro Nanquette kaj belaj desegnaĵoj de S-ino Baudour. Plue li prezentis al la profesorino belan tablotukon, donacon de la gelernintoj.

Post kiam S-ro van der Stempel ludis kelkajn pianopecojn, la laŭreatoj laŭvice regalis nin per serioza aŭ komika recitaĵo.

Por fini tiun interesplenan vesperon, F-ino R. Huysmans kaj S-ro Wuydts, alvestitaj, kune kantis „La Fiskaptisto“.

La parolatan ĵurnalon de la 1a de Julio aktive partoprenis multaj gemembroj. La plej multajn poentojn akiris: S-ino Weyn

por la tradukita teksto: „Fratineto“ kaj F-ino R. Huysmans por la legita teksto: „La alia ŝranko“. Kiel pridiskutinda temo estis elektata: „Por aŭ kontraŭ la Sporto“ de S-ro van der Stempel.

La 5an de Julio, okazis komuna legado el la libro: „Miru, Pensu, Ridu!“ ĉiu grupano laŭlegis tekstparton de la ĉapitro, kiu temas pri lingvokuriozaĵoj. Kontentigante sian lernemon, la ĉeestantoj streĉe kaj profite aŭskultis.

La 15an de Julio, anstataŭ la perfektiga kurso de S-ro van der Stempel, okazis „Tradukvespero“. Laŭvice ĉiu membro tradukis parton de franclingva teksto en Esperanton. Tiu ekzerco, kvankam ne facila, tamen tre plaĉis al la gemembroj kaj ĉiu, kun la helpo de la ceteraj, sukcesis akiri seneraran tradukadon.

La 22an de Julio, S-ro Jacobs gvidis amuzan vesperon. Komence, la grupanoj devis trovi la solvon de diversaj enigmoj sub formo de demandoj. Poste, li laŭlegis diversajn frazojn pri historiaj aŭ sciencaj temoj, en kiuj mankis unu vorto, kiun la grupanoj devis kompletigi. La plej multajn ĝustajn respondojn donis: S-ino Staes kaj S-ro Swinne.

Programo de la venontaj kunsidoj:

Septembro: La 1an: Parolata ĵurnalo; la 9an: „Nia Vojaĝo al Sicilio“, de S-ino J. Plyson kaj F-ino S. Obozinski; la 16an: Perfektiga Kurso de S-ro van der Stempel; la 23an: Parolado kun lumbildoj de la Liga Prezidanto, S-ro Maur. Jaumotte, kiu donos siajn impresojn pri „Vojaĝo en Hispanujo“ kaj samtempe disdonos la medalojn al la grupaj jubileantoj; la 30an: Diskutvespero.

Oktobro: La 7an: Disdono de la premioj al la laŭreatoj de la parolataj ĵurnaloj; la 14an: Parolado de S-ino R. Lecat pri „Einstein“ (dua parto); la 21an: Perfektiga kurso de S-ro van der Stempel; la 28an: Amuza Vespero.

LIEGO.

Dimanĉon la 28-an de julio je la 10-a matene, la Lieĝaj esperantistoj kunvenis en la salonoj de la Y.M.C.A. por ĉeesti konferencon farotan en esperanto de indonezia samideano, s-ro Mamesah Servius. En plej pura lingvo, la oratoro, reveninte el Anglujo, kien lia registaro sendis lin por partopreni internacian kongreson favore al la paco, faris malgrandan raporton pri sia vojaĝo. Poste li bonvoleme respondis al multaj demandoj faritaj de la ĉeestantaro, pri Indonezio.

Ĉar en la salono troviĝis personoj ne esperantistaj, la parolado de s-ro Mamesah Servius estis lerte tradukata de lieĝa samideano, s-ro T. Burnelle. Inter la ĉeestantoj

Radio

Aŭskultu la Esperantajn programojn de Ibra radio, Tanger, Afriko, la lastan mardon en ĉiu monato je la 20-a horo mezeŭropa tempo. Ondlongoj 19,9 m, 26,5 m kaj 30,3 m. Bonvolu sendi raportojn al Ibra Radio, Stockholm 1, Svedujo.

ni havis la plezuron vidi kelkajn esperantistojn el Verviers, nome gesinjorojn Hérion kaj s-ro Koeune. El Lieĝo ĉeestis ges-roj Burnelle, ges-roj Dejardin, ges-roj Lejeune, ges-roj Fassotte, s-roj Mathieu, Etienne, Soyeur, kaj aliaj kies nomon ni ne konas. Entute, proksimume 40 personoj aŭskultis tiun prelegon, kiu estis tre interesa por la Lieĝaj esperantistoj, kiuj malofte havas la okazon aŭdi esperantan paroladon faratan de eksterlanda oratoro.

* * *

Korespondantoj

(Sekvo de p. 42)

S-ro Stokjo Dimitrov, mahala Velčevska, Trojan, Bulgario, instruisto, fraŭlo, deziras korespondi pri ĉiuj temoj, per ilustritaj poŝtkartoj kaj leteroj — belaspekte afrankitaj per multaj diversaj poŝtmarkoj. Ankaŭ interŝanĝas Esperanto-gazetojn, poŝtmarkojn, fotojn k.t.p. Respondo certa. La anonco validas ĉiam. —

Filatelistoj! Mi deziras interŝanĝi PM., precipe kun Belgujo kaj najbaraj landoj. Reciproke mi donas ĉiujn polajn poŝtmarkojn (kaj el najbaraj landoj). Adreso: Prof. M. F. Walles — Al. Slowackiego 60/2 KRAKOW — Pollando.

D-ro B. Szenenyi, Hungarujo IV Hubau. 38 deziras interŝanĝi neuzitajn alumetikedojn kun ĉiuj landoj, escepte Ĉeĥoslovakujo kaj Jugoslavujo.

S-ro Vladimir Fiala, Repovc 117 p.p. Ml. Boreoslav (Ĉeĥoslovakujo) deziras korespondi kun belgaj samideanoj.

S-ro Paul Müller (10b) Wilkau-Hasslau, SA. Friedhofstr. 5. Germanujo/DDR. deziras korespondi kun belgaj samideanoj kaj interŝanĝi PM., IPK., L. pri ĉiuj temoj.

F-inoj Ana, Vera kaj Sonia kaj S-ro José COERA, rua Minas Gerais No 85 Barbacena — M. G. Brazilio, kaj dek aliaj samideanoj en la sama loko deziras korespondi. Nepre respondos.

„Młodzież Swiata“ koresponda klubo; Ul. Smolna 40 WARSZAWA 43 Polujo, en-

LISTO DE LA MEMBROJ-KOMERCISTOJ

Antverpeno

G. Faes, Schoenmarkt 16. Antverpeno. Muziko, Radio, Diskoj.
In 't Duifken (S-ano Paesmans), Lge Koepoortstr. 64: Kostumoj (5 0/0 rab.)
Vino Max Bolsius, Diepestraat 58-60, Antverpeno: Kuirejilaro. Tel. 32.57.85
M. Philips, Karel Rogierstr. 1, Antverpeno. Korsetoj - Rab. 5-10% por la membroj.
P. van der Hoydonck-van den Buys, Kapelsesteenweg 549, St. Mariaburg.
 Ŝuoj — Teksaĵoj — Merceraĵoj. Tel. 74.27.86
J. Montmirail, Kortemarktstraat 53, Berchem. Arĥitekto. Tel. 39.58.66
Morris de Ketelaere, Oostenstraat 25, Antverpeno. Hemiaĵoj. Tel. 39.17.09
S-ino Henny Jacques-de Ketelaere, Beeldekenstr. 31, Antverpeno. Gramofonaj diskoj por meminstruado. Tel. 33.75.38
Roger Jaumotte, Cyriel Buyssestr. 44, Antv. Anoncoj en tagjurnaloj. Tel. 37.47.14
K. Amerijckx, Melgesdreef 40, Merksem. Centra Hejtado. Tel. 45.81.07
R. De Soete-Vanistendael, Dambruggestraat 234, Antv. Okulvitroj — Rab. 5 0/0
CL. Peeters, Onderwijsstraat 68, Antverpeno. Apotekejo. Tel. 35.40.67
Firmo van Iseghem & Verstraeten, St. Bernardse steenweg 631, Hoboken.
 Vitraĵoj — Speguloj — Tel. 37.88.20
J. van Nereaux, Sterstraat 1, Antverpeno. Viandisto. Tel. 39.55.81
H. Peeters, Vordensteistr. 58, Schoten. Ingen.: Neon-lampoj, Reklamoj. T. 81.48.47
H. Jacques, Lange Beeldekenstraat 31, Antverpeno. Presaĵoj. Tel. 33.75.38
Verdijck, St. Rochusstraat 174, Deurne. Ĉiaj asekuroj kaj hipotekoj. Tel. 39.06.07
P. Peelman, Volkstraat 34, Antverpeno. Fumaĵoj — Pantofloj. Tel. 37.62.55
Y. Ameryckx, Pr. Leopoldstraat, Borgerhout. Peltaĵoj
A. van den Neste, Deurnebaan 30, Merksem. Presad-inkoj. Tel. 45.78.59
J. Van Hoof, Marialei 7, Antw. - Pentraj-entrepreno. Tel. 39.35.33

Bruĝo

Marcel Poupeye, Elf Julistr. 32. Ĉiaj asekuroj en la tuta lando. Tel. 371.93
Charcuterie Strovi, Vlamingsstr. 48 (Teatroplaco) Viandvaroj. Tel. 334.08
Maison Joye, Gelmuntstr. 29. Ĉemizoj, Gantoj, Kravatoj. Tel. 332.75
Firmo G. Verbeke, spinolarei 19: Konstrumaterialoj. Specialaĵoj: naturŝtono de Jura. Tel. 321.85
Pan- kaj Kukbakisto R. ROSSEEL, Mariastraat 30, Konsumsalono. Tel. 338.34

Bruselo

M. Jirousek, 104 rue du Téléphone; reklamoj kaj litertipoj 18.77.67
Farmaciisto Jacobs, 94, rue général Eenens Bruxelles 3 15.26.01
Farmaciisto N. Nelis, Meise 59.13.73
„BONBONS SWINNE“, 77, rue de Nieuwenhove 44.57.36
Imprimerie Liens, 18, rue de la Princesse 21.10.98
CARRELAGE „Carrart“, 19, avenue de Saxe 21.74.49
Viajn MEBLOJN ĉe S-ro Weyn, aĉetu rue Destouvelles, 57 15.96.97
Libroj, Publikadoj, ĵurnaloj, F-ino Kestens 24, rue Bodenbroeck 11.71.03
Tinkturejo, senmakuligejo „TEX“ 11, Av. du Couronnement,
 Woluwe St. Lambert 70.75.82

KOMERCISTOJ kiuj senkoste propagandas por Esperanto per reklamojn siaj butikoj

G. Baeten, Belpairestraat 53, Berchem. Tel. 39.22.81. Frizisto por sinjorinoj
„De Boerinekens“ (Clem. Van Hassel). Estro de la trinkejo en la Flandra Operdomo
A. Roels, Montignystraat 155, Antverpeno. Ledaj artikloj-Selisto. Tel. 37.14.07
G. Goemaere, P. Genardstraat 39, Antverpeno. Speciejo, laktejo
Vandersmissen, Kampioenstr. 11, Antverpeno. Paperaĵoj, parfumaĵoj
Librejo Schuttershof, Schuttershofstr. 36, Antv.: luo, aĉeto, vendo de libroj
Vojaĝ-agentejo Pier Busseti, Hopland 5, Antv.: privataj kaj grupvojaĝoj

sendis al nia redakcio sian 6an bultenon enhavantan tutan serion da korespondemuloj, inter kiuj multaj esperantistoj. Tiuj kiuj deziras korespondantojn, eĉ en la diversaj eŭropaj lingvoj, povas sin rekte turni al supre adreso. Ili certe trovos respondonton.

F-ino Odincova Rimma, Krasnokamenka, 61. JJALTA, U.S.S.R. deziras korespondi kun belgaj samideanoj pri ĉiuj temoj kaj interŝanĝi IPK.

S-ro Eugen Matirko, KOSICE, Orlia 4.1

Ĉeĥoslovakio, deziras interŝanĝi la tole binitan romanon de B. Prus „La Faraono“ kontraŭ varoj. Oni petu rektan informon aŭ direktu sin al nia redakcio.

Dekduo da samideanoj en Valencia (Hispanujo) deziras korespondi. La aĝoj varias de 16 ĝis 69 jaroj. Ĉar ni ne povas enpresii ĉiujn anoncetojn aparte, interesatoj direktu sian leteron al S-ino Consuelo Pallas Martinez, Calle/Mar No 7 pa. 7a, kiu certe bonvolos disdoni laŭ via sugesto.